Universala Esperanto-Asocio



AKTIVULA MATURIGO
Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2017-06 sendita el Kutaisi, la 2an de aprilo.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo (kun fontagnosko) inkluzive de la alkroĉaĵoj.

# EKEK – ideoj naskiĝis el la FLAM'

Kun kvardeko da partoprenantoj la 10a Mezorienta Kunveno proksimiĝas al la fino. Fine de la dua tago, la partoprenantoj de la 31a Seminario pri AMO revizitis la rezultojn de la antaŭtaga FLAM-analizo por diskuti solvojn aŭ tiri konkludojn. Jen la rezultoj de tiu sesio. EKEK: Evoluigi la fortojn, Kuraci la Lamaĵojn, Ekspluati la Avantaĝojn, Kontraŭi la Minacojn.

==============

## EVOLUIGI la FORTOJN

**FORTOJ**

- Solvo en multlingva regiono.
- Lingvo sen poseda lando.
- Firmigilo por translimaj mond-perceptoj.
- Turismo – solvoj per Esperanto.
- Komerca agado per Esperanto.
- Tutmonda E-komunumo.
- Lernfaciliga efiko.
- Pontolingvo kultura.
- Rekonata kiel literatura lingvo.

**Organizi lingvajn festivalojn:** Tio emfazas la egalrajtecon de diversaj lingvoj, kaj lokas Esperanton inter tiuj valorindaj lingvoj. Ĝi altigas la konscion pri komunikaj defioj en multlingva mondo.

**Eluzi la potencialon de Esperanto en turismo:** Depost la fermo de la centro de Bydgoczsz, ioma vakuo restas, indas reaktivigi la asocion *Monda Turismo* aŭ starigi novan. Gravas malfermi centrojn aŭ agantojn en turisme allogaj areoj, kiuj proponos servojn ne nur al esperantistoj.

**Evoluigi la uzon de Esperanto en la Komerco:** Gravas kunlaborado kun IKEF, kaj pretigi datumbazon de funkciantaj aŭ naskiĝantaj projektoj; Necesas rezisti la argumenton, ke esperantistoj kiel idealistoj, ne miksu sin en komencajn agadojn. Klare, unu el la kampoj por komerco estas turismo, alia estas livero de klerigaj servoj.

**Konigu la pontlingvan rolon de Esperanto en literaturo:** Sukcesis kelkloke la uzo de Esperantaj tradukoj el malpli konataj lingvoj, por permesi plutradukon al aliregionaj malpli konataj lingvoj. Tiel sukcesas kultur-transmigroj, kiuj ne okazis pere de la grandlingvoj. Necesas pli forte konigi tiujn projektojn, krome dokumenti la organizadon malantaŭ ili, por kuraĝigi aliajn starigi similajn projektojn.

**Pontolingva instruado:** Ripetu alimaniere la siatempajn eksperimentojn, en kiuj oni pruvas, ke kelkmonata studo de Esperanto pliefikigas la lernadon de alia celata lingvo (precipe hindeŭropa). La retepoko donas novajn eblojn pli simple testi kaj pruvi la tezon.

**Eluzi la parolkomunumon kaj ĝiajn strukturojn:** Esperanto unikas inter planlingvoj, ke ĝi havas tre internacian parolkomunumon kune kun ellaboritaj strukturoj: Akademio, universitataj retoj, landaj kaj kontinentaj agadoj ktp. Tio helpas al ni rapide disvastigi konatecon pri novaj projektoj kaj akiri kunlaborantojn.

## LAMAĴOJ

- Malfacilecoj renkontiĝi kaj kontaktiĝi.
- Manko/modifoj de E-historio en la regiono.
- Malabundo de bonaj informiloj, retejoj ktp.
- Lingva diverseco – pluraj lingvoj servendaj.
- Limigitaj tradukoj el la regiono.
- Nemultaj aŭ nekonataj kulturaj produktoj.
- Malfacilecoj konigi la E-kulturon.
- Malmulteco de kapablaj gvidantoj.

## KURACI la LAMAĴOJN

**Pli efike mobilizi niajn hom(mal)fortojn:** Potenca bremso al nia progreso estas niaj modestaj laborfortoj. Pli efika organizado kaj kunordigo eluzus la fortojn, kiuj ekzistas: por traduki, por verki, kaj literature kaj lingvo-prezente. Gravas profundigo de la kapablo organizi allogajn eventojn (temo por iama AMO-seminario).

**E-centroj kaj renkontiĝejoj:** La modelo de E-centroj de la 80aj jaroj de la antaŭa jarcento jam ne prosperas. Kreendas nova modelo por E-centroj, ekonomie vivipovaj, kiuj proponos servojn ne nur al la esperantista komunumo, sed pli vaste. Gravas, ke e-istoj sciu, kie kaj kiam ili povos aliri esperantan etoson.

**Konigo de aranĝoj:** Ĝis nun la plej ampeksa kalendaro de eventoj estas ĝuste ĉe *Eventoj.hu*. Ĝi akceptas ĉion, kiun oni orde raportas. Nun ĉe UEA la revuo *Esperanto* ekhavas retejon, kiu povos same prezenti kalendaron pli ampleksan ol tiu en la presita revuo. Ĉiukaze, la esperantistoj atendas povi trovi multe pli frue informojn pri la gravaj eventoj – nelaste pri UK. Kalendaroj kaj simile devas ne nur konigi datojn kaj urbojn, sed kiujn unikaĵojn kaj specifaĵojn proponas difinitaj aranĝoj. La reto permesas aliri tiujn informojn, sed la event-organizantoj devas ilin bontempe fiksi kaj diskonigi. Esenco de komunikarto estas koni la bezonojn de la inform-ricevantoj – necesas demandi: kiam ili faras siajn decidojn pri partopreno en aranĝoj, kiuj estas la informoj, kiujn ili bezonas, kaj ĝis kiam, por fari konvenajn decidojn.

**Vastigi la eblojn uzi la lingvon praktike:** Kreskas niaj ebloj kaj atingoj pri informado kaj instruado, sed daŭre malfortas nia kapablo proponi konkretajn uzojn de la lingvo. Tiuj uzebloj alios por Esperanto ol por aliaj 'grand'lingvoj; ni devas pli klare difini kaj kreskigi ilin.



Debatantoj ege pensas, arde gastas. La esenco de AMO kaj FLAMO! Fotoj: SMG

## EKSPLUATI la AVANTAĜOJN

**Intensigi la uzadon de retaj ebloj:** Unuaflanke por liveri pli bonajn servojn al esperantistoj, inkluzive de la filmado de eroj el Universalaj Kongresoj kaj aliaj gravaj eventoj, por ke homoj ne povantaj fizike ĉeesti povu gustumi la enhavon. Sed aliflanke, vastigi la videblon de Eo por pli sistema informado en aliaj lingvoj, eventuale en kunteksto de pli vastaj celoj – daŭripovo, komunika justeco ks.

**Malplialtiĝantaj vojaĝkostoj:** Vastigi la eblojn por organizitaj prelegvojaĝoj, kiel delonge funkcias bone en Francio. Esperantistoj eluzu siajn konojn por proponi allogajn vojaĝservojn kaj praktikajn konsilojn por memvojaĝantoj.

### AVANTAĜOJ

- Granda evoluo de la reto – demokratigo de komunikado.
- Aliancoj estas la agantoj por lingvaj rajtoj – similideanoj.
- Mildigo de vojaĝkostoj por aliri renkontiĝojn.
- Lingvo-lernemo – propedeŭtika valoro.
- Bezono por logika kaj problemsolva pensado.
- Sopiro je pli kontentiga turismo.
- Senperforta lingva disvastigo.

**Lingvaj Kunpuŝiĝoj:** Esperanto povus ludi mildigan rolon, sed ne se ĝi aliancas sin kun unu flanko de la kunpuŝiĝo. Necesas ĉiam senpartie interveni.

**Propedeŭtika valoro:** Konsideru tion pli ol nur lernfaciligo, sed kiel humaneca kontribuo, por evoluigi la kapablon pli bone lerni pensi.




Inter la konstatoj: ekspluatu pli komplete la turismon. Grupo antaŭkongresa antaŭkaverna.

## KONTRAŬI la MINACOJN

**Militoj, diktaturaj regantoj:** Malfacilas multon fari rekte; provindas aliĝi la pac-movadoj aŭ partopreni en pac-studoj.

**Voĵaĝmalebligoj:** En la regiono vizito al unu lando povos malfaciligi aŭ malebligi eniron en alian landon. Foje eblos renkontiĝi en apudaj sed "neŭtralaj" lokoj.

**Komuniklimigoj:** Tiuj povas ekzisti, sed troveblas 'etaj pordoj'; konsiloj pri alternativaj komunik-kanaloj devus esti troveblaj.

**Fondusoj kaj subtenaj projektoj:** La enmovadaj ebloj estas modestaj, sed ekzistas programoj por ebligi partoprenon de indaj aktivuloj en UK, en kongresoj de ILEI, TEJO kaj aliaj. Limigitaj sumoj ekzistas por regiona evoluigo; nur bone prezentitaj buĝethavaj projektoj havas ŝancojn. Ekstermovadaj subtenoj estas ĉiam esplorindaj.

**Seksa diskriminacio:** En la koncernaj landoj eble organizindas kunvenoj nur por virinoj, kie eblos konigi la E-komunumon.

**Antaŭjuĝoj:** Tiuj povas varii laŭ regionoj kaj tra la tempoj. Iuj antaŭjuĝoj eksmodiĝis kaj jam ne bezonas reagojn, sed novaj antaŭjuĝoj povas naskiĝi – gravas frue rekoni ilin.

**Difini pli klare la valorojn de Esperanto:** Tiu punkto jam listiĝis sub 'Lamaĵoj' sed ripetindas: ni devas ellabori strategiojn pli klare prezenti ilin al kursanoj kaj interesatoj.

====================

## MINACOJ

- **Militoj, diktaturaj regantoj.**
- **Politikaj malpacoj inter landoj – vojaĝlimigoj.**
- **Bremsado de komunikebloj.**
- **Nefortaj ekonomiaj cirkonstancoj.**
- **Ne-egalrajteco por virinoj en kelkaj landoj.**
- **Misinfluo de grandaj lingvoj.**
- **Neapliko de modernaj rimedoj.**
- **Antaŭjuĝoj pri Esperanto.**

Pri la cetera enhavo de la Mezorienta Renkontiĝo necesos raporti alifoje. Sufiĉas noti, ke okazis post pluraj prezentaĵoj viglaj diskutoj. En lastaj minutoj finiĝis muzika kaj danca spektaklo por doni kulminon al la kvartaga renkontiĝa sperto. En la lasta tago okazos pritaksa sesio kun la kompilo de rekomendoj, sed pro la neceso de pluraj kunvenintoj (inter ili via EKO-isto) tuj ekvojaĝi al Armenio, nur poste eblos raporti tiujn rekomendojn.

Vortoj = 960





Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupo aŭ kialo por via ĉeesto en la ekspedolistoj.